# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k64.htm



Kamarado Rèmy prezentas la libron de li tradukita

Nro 64a Oktobro/decembro 2004

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marín Esparta, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**


*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* **nova konto** *nº* **2043-0138-14-090002040-3** *Sen aldona* **kosto.** La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kajeroj el la Sudo** regule interŝanĝas kun:

1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marĉek,
2 **Boletín**, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
3 **Monato**, de Stefan Maul,
4 **Juna Amiko**, de Geza Kuruez,
5 **Sennaciulo**, de Kreŝimir Barkoviĉ,
6 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
7 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
8 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Puil,
9 **Litova Stelo**, de Petras Ĉielauskas,
10 **Laŭte!**, de C. Baudé,
11 **La Migranto**, de Antje Noordewier,
12 **Juna Penso**, de Vinko Markov,
13 **SLEA-Informilo**, de P. Persson,
14 **Naturista vivo**, de Ervin Fenyvesi, kaj
15 **La verda proleto**, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



**Kovrilo**: Kamarado Remi Buŝe' prezentas la libron de li tradukita, Vivbruligita, dum la kongreso de SAT en Bratislavo.

## Enhavo

Redaktore ..... 3
Informoj de la prezidanto ..... 4
Deklaracio de Hiroshimo ..... 5
Rezolucio de Bilbao ..... 7
La vaska patrolando ..... 8
José do Nascimento Marqués ..... 10
Oni bezonas profesorojn ..... 11
Centraj paĝoj ..... 12
Ne estis sonĝo, ĝi okazis! ..... 14
Deklaracio de la 77ª Kongreso de SAT ..... 17
Salutvortoj de la Prezidanto de la PK en Bratislavo ..... 18
Salutvortoj de la Prezidanto de UEA ..... 21
Muziko ..... 22

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore

Ĉi tiun numero de **Kajeroj el la Sudo** estintus iomete *alitipa* pro la enhavo, ĉar ne aperontus artikoloj dediĉitaj al la Kongreso de Ĉinio. Bedaŭrinde, nia bulteno estas malgranda, kaj mi devis elekti ĉu bone informi pri la kongreso de SAT aŭ tiu de UEA, kaj mi decidis, ke la venontan numeron de nia bulteno, ni povus informi pri la cetera agado de Esperantistoj, dum nun ni koncentriĝu pri la agado de SAT.




Se veras, ke estis problemo pri tio, ke mi ne ĉeestis la Kongreson de SAT je Slovakio, mi esperis, ke kamarado sendus al mi informon tian, ke mi povus uzi aŭ reverki ĝin iomete tiel, ke vi ĉiuj estu informitaj pri la kongreso de SAT. Mi trovis artikolon verkitan de Grazina Opulskiene je http://satesperanto.free.fr/kongresoj/kongreso2004/impresoj.html, kiun mi povus publikigi ĉi tie por diskonigo de la jara plej grava evento de SAT, sed bedaŭrinde la aŭtorino neis sian permeson tion fari, do mi sendas la scivolan leganton al tiu adreso de interreto por trovi la impreson de kongresanino tie. Se li aŭ ŝi ne havas retaliron aŭ la ŝancon legi ĝin rekte en la oktobra numero de **Sennaciulo**, mi diros, ke la evento okazis en la ĉefurbo de Slovakio, Bratislavo, (kiun ni vidas en la foto ĉipaĝa!) je aŭgusto de 2004, kun partopreno de 140 anoj de SAT veninte el 19 diversaj landoj. La Prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT salutis per tiu prelego, kiun ni publikigas je paĝo 18 de ĉi tiu numero, kaj laŭ la kongreso estis kvar laborkunsidoj. Interese estas, ke en la sama urbo samtempe okazis la Konferenco de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj, do kongresanoj de ĉiu evento povis ĉeesti la alian. Aldone, okazis ekskursoj al burgaj ruinoj Devin, al la historia parto de Bratislavo, al kanalo Gabcikovo-Danubo, al atomcentralo Bohunice, al Malè Karpaty kaj al aliaj malnovaj urboj de Slovakio. Estas ankaŭ notinde, ke dum la kongreso oni prezentis la libron tradukitan de nia kamarado Rèmy Buŝe', **Vivbruligita**, kies aŭtorino Suad rakontas en ĝi siajn travivaĵojn, aparte kiel kaj kial siaj parencoj bruligis ŝin pro tio, ke ŝi kuraĝis havi bebon sen edziniĝi antaŭe. Ni taksis tiun libron tiel grava, ke ni ne povis venki la tenton prezenti ties prezentadon en Esperanto en nia kovrilo.

Pro tio, anstataŭe mi prikomentas la Kongreson de Ĉinio je paĝo 14ª, sed mi informos pli longe pri ĝi la venontan monaton.

# Informoj de la prezidanto

Finis la someron kaj finis la kongresojn kaj fine finis la utopio de Esperantio sed ne la Esperantio de nia koro.



SAT kongresumis en Bratislava kaj mi legis en **Sennaciulo** artikolon farita de Grazina Opulskiene, nomita **Sub la suno de Bratislava** kie la autorino skribis *Pri Kvar Kongresaj kunsidoj mi volas diri ke laŭ mi ili estis vere laborkunsidoj, ne parolkunsidoj:* estas bone ke la membroj de la Asocio laboras kaj ne faras paroladon de kafejo.

UEA kongresumis en Pekino kaj denove estis elektata Renato Korseti kiel Prezidanto.

Ne estas bona la rilato inter SAT kaj HALE: laŭ lasta novaĵo, la Plenum-Komitato de SAT petas forigi Jesuon de la Heras kiel membron de SAT. Tio signifas, ke la spirito de Inkvizicio ankoraŭ regas en SAT, aŭ almenaŭ en ties Plenum' Komitato.

Ni devas rememori ke Jesuo jam estis forpelita de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT sen akto de akuzoj konkretaj, kio malebligis sindefendon. SAT ŝajnas eta diktadoreco, nur mankas koncentrejoj kiel GULAG Insularo.

Aliaflanke en HALE oni forpelas neniun, oni ne faras aktojn de akuzo sen konkretaj argumentoj aŭ ĝenerala akuzo, ĉar HALE, laŭ la lastaj kongresoj, estas progresema asocio.

Sed oni ne forgesu, estimataj legantoj, kiu estas en la korekta vojo, kiuj estas la defendantoj de homaj rajtoj, kiu asocio havas kaj al kiu mankas inkvizicia spirito.

HALE estas progresema asocio, kiu defendas malebligon de inkvizicio, ĉar ĉe ni ĉion oni argumentas, eĉ aferojn, kiuj ne plaĉas al ni, dum en aliaj asocioj oni diskutas nenion, sed agas kaprice kaj senklarige. Tamen, ne mankas homoj, kiuj estas *de SAT* kaj sekve nenio, kion oni faru nome de SAT povas esti malbone farita, dum ĉio, kion HALE, eĉ se progresema asocio kie perforto kaj kapricaj misfaroj de estraro simple ne eblas, ŝajnas esti erara, nekonvena kaj abomeninda al kelkaj homoj. Ni petas, ke oni pensu per si mem, kaj petu respondecon al responsuloj.

SAT havas grandan problemon nun, kiu estas sia nuna Prezidanto, ĉar li ne respektas la regulojn de la asocio, kaj li ne agas laŭ tiuj reguloj.

Antaŭ kelke da tempo la granda problemo estis ke Jesuo ne estas SATano kaj de la Prezidanteco de SAT oni neis ĉiun iniciaton de Jesuo ĉar li ne estas SATano. Jesuo iĝis SATano kaj nun la Prezidanto kaj aliaj forpelas Jesuon de Sat… Ĉu oni komprenas ion?

Se oni sukcesus eksSATigi Jesuon, tio estus grava mispaŝo, ĉar tio malebligus studi kaj pripensi la iniciatojn de Jesuo, kaj de aliaj homoj, kiuj prenos la kazon de Jesuo kiel ekzemplon pri tio, kion oni ne devas fari se oni deziras ne esti ĵetita de SAT: pensi per si mem. Ni fidas je la sendependeco kaj laŭjusta pensomaniero kaj agado de la Konflikto Komisiono, kiu eble jam decidas, ke se ekzistas konfliktoj inter Jakvo aŭ alia personoj de SAT kun Jesuo, ili solvu ilin private, sed tio ne makulu la bonan nomon de la tuta asocio, kiu ne sole apartenas al la Plenum-Komitato aŭ al la nuna anaro: ĝi ankaŭ apartenas al la estintaj kaj estontaj anoj.

La rilato inter SAT kaj HALE estas kvazaŭ ĉapitroj de televidnovelo, kie nenio finas. Estimataj HALEanoj kaj legantoj, ĝis la venonta ĉapitro de la milito inter inkvizicia SAT kaj progresema HALE.

*Johano*

# Deklaracio de Paco de HIroŝima

«Neniu herbo aŭ arbo kreskos dum venontaj 75 jaroj.» Nun 59 jaroj estas pasintaj de la 6a aŭgusto kiam Hiroŝima estis tiel plene malaperigita ke multaj homoj cedis al tia pereo. Dekoj da kadavroj ankoraŭ portantaj la doloregon de tiu tago, animoj adiaŭintaj siajn amatojn kaj esperon de estonteco, estas lasttempe returnitaj al Insulo Ninosima. Tio avertas nin atenti la absolutan kontraŭhomecon de la atombombo kaj teruraĉan hororon de milito.




Bedaŭrinde al la homaro ankoraŭ mankas ambaŭ vortoj kiuj povas esprimi plene tian mizeron kaj sufiĉa imagkapablo plenigi la truon. Ni flosas mallaboreme laŭ la fluo de tempo, niaj lensoj de racio estas nebuligataj, kaj ni turnas niajn dorsojn al malmultaj kuraĝuloj.

Kiel rizulto, la egocentra mondovido de Usono estas atinginta la ekstremon. Neglektante UN kaj ĝian fondon de internacia leĝo, Usono rekomencis esploron de nukleajn armilojn pli malgrandajn kaj pli «uzeblajn». Ĉeno de perforto, teroro, eniro al la senvalora «nuklea asekuro» de Norda Koreio kaj aliaj estas simboloj de nia tempo.

Ni devas rekonstati ĉi-tiun krizon de la Homaro en la kunteksto de la historio de la Homaro. En la jaro ĝuste antaŭ la 60a jaro, kiu komencos novan ciklon de ritmo de la interplekta ŝtopo de homaro kaj naturo, ni devas returni al nia deirpunkto, la senprecedenca sperto de l' atombombo.

Por tio, la urbo Hiroŝima, kun la Urbestroj por Paco kaj nia 611 membraj urboj el 109 landoj, deklaracias ke la periodo kiu komenciĝas hodiaŭ kaj finiĝos la 6an de aŭgusto, 2005, estu la Jaro de Memoro kaj Agado por la Mondo sen Nukleaj Armiloj.

Nia celo estas realigi belan «floron» por la 75a jaro de atombombo, t.e., totalan abolicion de ĉiuj nukleaj armiloj el Tero ĝis la jaro 2020. Nur tiam ni havos veran esperon de vivo sur la planedo, sur kiu «neniu herbo aŭ arbo kreskus».

La semoj kiujn ni semas ĝermos en Majo 2005. Ĉe la Konferenco de Revizio de la Traktato sur la Ne-Dismultiĝo de Nukleaj Armiloj (NPT) en Novjorko, la Urĝa Kampanjo d'Abolicio de Nukleaj Armiloj okaziĝos kun urboj, civitanoj, kaj NROj el la tuta mondo, laborante kun samideaj landoj, por adopto de agoprogramo kiu enhavas signaturon en 2010 de Konvencio de Nukleaj Armiloj kiel laborkadro d'abolicio de nukleaj armiloj ĝis 2020.

Tra la tuta mondo, la Urĝa Kampanjo estas kreskiganta ondojn de subteno. En la lasta Februaro la Eŭropa Parlamento

trapasis kun superforta multeco rezolucion subtenantan la kampanjon de la Urbestroj por Paco. En Junio la Usona Konferenco de Urbestroj, de 1183 Usonaj urbestroj, trapasis rezolucion pli fortan.



Halo por promocio de industrio de Hiroŝimo, la sola domo, kiun la bombo ne faligis.

Ni anticipas ke Usonanoj, popolo de konscienco, sekvos la gvidon de iliaj urbestroj kaj fariĝos ĉefa fluo de subteno de la Urĝa Kampanjo kiel esprimo de ilia amo al Homaro. Ni esperas ke ili plenumos devon kiel la sola superpoveco por abolicii nukleajn armilojn.


Ni estas strebanta komuniki la mesaĝon de la Hibakusya'oj tra la mondo kaj promocias la Kurson de Studo de Paco de HIroŝima-Nagasaki por ke estonta generacio komprenos la kontraŭhumanecon de nukleaj armiloj kaj kruelecon de milito. Dum la venonta jaro ni efektivigos projekton kiu mobilizos plenaĝulojn legi spertaĵojn de l' atombombo al ĉiuj infanoj ĉie.

La Japana registaro, kiel nia reprezentanto, devas defendi la Pacan Konstitucion, pri kiu ni japanoj estas fieraj, kaj devas klopodi por korektigi la emon de akcepto de milito kaj nukleaj armiloj enlande kaj eksterlande. Ni postulas ke nia registaro agu kiel la registaro de la sola A-bombita nacio kaj fariĝu la monda gvidanto de l' abolicio de nukleaj armiloj, farante kontraŭnuklean *cunamon*[1] subtenantan la Urĝan Kampanjon de la Urbestroj pro Paco. Ni postulas pli varman politikon por Hibakusya'oj, kiuj estas maljunaj, inkluzive de tiuj kiuj loĝas eksterlande kaj tiuj kiuj suferis la nigran pluvon.

Ni faros ĉion kiel eble dum la venonta jaro por certigi ke la 60a jaro de l' atombombo estu ekfloriĝo de espero por la totala abolicio de nukleaj armiloj. Ni humile oferas ĉi-tiun promeson por la pacema ripozo de ĉiuj viktimoj de l' atombombo.

*La 6an Aŭgusto 2004*
*Urbestro de HIroŝima*
*Tadatosi Akiba*
*tradukita de Tetu Makino*

*Little Boy,* knabeto, la bombo, kiu detruis Hiroŝimon.







[1]*Cunamo* estas origine japana vorto, jam akceptita en Esperanto, kiu signifas «ondego mara» (Kfr. NPIV, paĝo 201)

# REZOLUCIO DE BILBAO

Kunveninte okaze de la 6ª Eŭropa Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en Bilbao de la 25ª ĝis la 28ª de aŭgusto de 2004, la 284 partoprenantoj el 24 landoj:

**Substrekas**, ke la homaranisma principaro de la Esperanto-movado, kaj ĝia celo al libera interkompreniĝo inter la homoj kaj la popoloj kaj al paco, tute kongruas kun la tuteŭropa volo konstrui Eŭropon enpaciĝinta, unueca, harmonia kaj riĉigita de siaj multspecaj kaj multlingvaj kulturoj.

**Substrekas** sian firman subtenon al la principo de strikta lingva egalrajteco kaj de neŭtrala multlingvismo.

**Notas**, en la aplikado de tiu principo, la implicon de la teknikaj kaj financaj malfacilaĵoj, kiujn devas alfronti la eŭropuniaj servoj pri tradukado kaj interpretado, kaj kiujn hodiaŭ pligravigas la plivastiĝo de Eŭropa Unio.




**Konstatas**, ke en la eŭropuniaj instancoj - same kiel en multaj eŭropaj organizaĵoj, eĉ en la eŭropaj membro-ŝtatoj kaj ties instruadaj sistemoj - pli kaj pli nur unu nacia lingvo estas privilegie konsiderata kiel sola bazlingvo de komunikado kaj informado tiel malfortigante komunan eŭropan identecon.

**Konstatas**, sekve de tiu privilegio, ankaŭ la lingvan diskriminacion de multegaj dunganoncoj, kiuj proponas postenojn rezervitaj nur al denaskaj parolantoj de tiu nacia lingvo, kaj kiu tiel iom post iom kreas ties faktan hegemonion.
**Kondamnas** tiun faktan lingvan hegemonion, kiu kontraŭas ĉiujn principojn de egaleco, objektiveco kaj demokrateco, kiu maljuste favoras iun malplimulton de eŭropaj civitanoj, kaj el kiu aŭtomate fontas kultura, ekonomia, socia kaj politika superregado kaj mallojala konkurenco.

**Certas**, ke solvo de tiuj problemoj povas kuŝi en la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto, pro ĝiaj ecoj de facileco, precizeco kajlogika konstruo, de prononca homogeneco kaj de rapida adapteblo, kiel traduka kaj interpreta pivotlingvo en la eŭropuniaj instancoj, kajkiel lingvinstrua helpilo en la instruaj sistemoj de la membro-ŝtatoj.


**Proponas**, surbaze de rezolucioj de Unesko de 1954 kaj 1985 priinstruado de Esperanto, kaj de la konkludoj de la raporto «Ĝeneralaj aranĝoj pri multlingvismo», alprenita de la Eŭropa Parlamento en 2004, ke la Eŭropa Parlamento starigu interpartian grupon por funde pristudi la nunajn eŭropajn lingvajn problemojn, la diversajn ekzistantajn solvojn kaj la eblecon proponitan per Esperanto.

**Sugestas**, ke tiu prilingva grupo rapide iniciatu eksperimentojn -zorge kontrolotajn kaj mezurotajn de fakuloj kaj parlamentanoj de uzo de Esperanto kiel traduk-interpreta pivotlingvo en la EŭropaParlamento, kaj ke ĝi konsilu al ĉiuj membro-ŝtatoj simile kontrolotajn eksperimentojn pri enkonduko kaj instruado de Esperanto en iliajn instrusistemojn.

*En Bilbao, la 28-an de aŭgusto 2004.*

# LA VASKA PATROLANDO

Laŭ la maniero per kiu la nazioj, hodiaŭ mem, neas la ekzistadon de ekstermigintaj kampoj, en kiuj estis masakritaj milionojn da judoj, ciganoj kaj komunistoj, per maniero identa je disfaldita modo, la cionista ŝtato de Israelo, kiam ne rekonas la historian ekzistadon de la palestina popolo, kaj ankaŭ la terorista ŝtato de Hispanio, rifuzas la kulturan identecon kaj la rajtojn de la vaska popolo. Okazas, ke, se ne ekzistintus la ekstermaj kampoj, kiel povus la judoj elmontrigi la nazian rasismon?




Se Palestino estas eventaĵo, kiel povas la palestina popolo plende protesti pri siaj grundoj? Ĉu la Eŭska Herio (vaska lando) estas fikcio? Kiel iu povas reklamacii sian propran Vaskan Landon?

**Iom pri historio**

La multaj etnoj, kiuj travivis sur la duoninsulo Iberio formigis fandilon da kunvivantaj popoloj, kiuj dum multaj jarcentoj sin elvolviĝadis je paco, kun siaj propraj kutimoj plene da buntaj tradicioj kaj folkloroj, ĝis kiam ekaperis sur la teatra scenejo de la duoninsulo Iberio, la ungegoj de la uzurpaj gereĝoj de Kastilio-Aragono, kiu en 1512 sin alpropigis de la pli antikva iberia etno, la vaska popolo.

Multaj jarcentoj antaŭ Kristo, jam la iberoj, estis sur la duoninsulo. Tiu ĉi popolo, la iberoj, kvankam ne lertaj terkulturistoj, jam sciis elfosigi la metalojn por ellabori siajn proprajn armilojn. Estis laborema popolo de ordinaraj kutimoj; kies denaskdeveno oni ĝin juĝas, rekte, de la vaska popolo.

Je necerta epoko, la duoninsulon Iberion invadis, elvenintaj tra Ia Pirineaj montaroj, la keltoj, kiuj post kelkaj jaroj da bataloj inter keltoj kaj iberoj interkunfandiĝis je la keltiberoj. Tiu ĉi popolo, kiu sukcesis je grado, relative rapida al la antaŭenigita civilizacio, kaj kune kun la kantabroj, asturoj, vaskoj, galaikoj, kaj la luzitanoj al okcidento formigis la verajn etnojn kiuj konsistigis la duoninsulon Iberio.

Aliaj popoloj pli antikvaj daŭre sin starigis sur la sablobordoj kjuj ĉirkaŭas la duoninsulon Iberio, celinte la negocadon, kun la

enloĝantoj. Ili estis: la fenicoj, grekoj kaj kartaganoj. Tamen, estante la kartagenanoj pli povaj, post Ia renverso de fenicoj kaj grekoj, la kartagenanoj, pretendis sin alproprgi de la duoninsulo. La keltiberoj, dum multaj jaroj batalis kontraŭ la kartagenanoj. Sed jam lacegaj antaŭ tioma batalado kaj pro timo je la malvenko, ili alvokis la romianojn je sia helpo. Tion sendube faciligis, al la Imperio la mastrumadon de la duoninsulo. Tiel la Romia Imperio, pligrandigis sian teritorion. Tamen, ili trovis la feran rezistadon de la luzitanoj!

La luzitana popolo, estis tiom lerta por la armado de insidoj, kiel eltrovi tiun de siaj malamikoj. Ili estis tiom viglaj kaj rapidemaj kiel estas ĝenerale la montaranoj, ke la romanoj povus ilin venki nur per la perfido.



Tiu ĉi popolo, lokita sur Herminiaj Montaroj (Portugalio), kiu restas inter la riveroj Doŭro kaj Tejo kaj la Atlantiko okcidente. La ruza romana generalo per mensogoj kaj promesoj al la luzitanoj, ke ili deponu la armilojn, ĝuste antaŭ la batala konfrontado, poste, li sur ilin praktikis hororan mortigadon.

Viriato, heroa luzitano, humila bestgardisto sur la Herminiaj Montaroj, estrinte ĉiujn, kiujn sin forsavis en tiu batalo en 149 A.K. antaŭ Ia kanajlaĵo de Galba, dum jaroj puntrudis malvenkojn sur malvenkoj, ĝis kiam Cepiono (romia generalo) subaĉetis al du el la subuloj de Viriato, kiuj lin mortigis, dum lia ripozo en sia dormotendo (en la jaro 139 a.K.).

En Ia V-a jarcento barbaraj nordaj popoloj: alanoj, suevoj ka) vandaloj, kiuj invadis Galion, trairis la Pirinean Montaron kaj praktikis en ia duoninsulo la plej grandan dezertigadon. Malantaŭ ili alvenis aliaj barbaroj, la vizigotoj, kiuj sukcesis estrigi la tutan duoninsulon. Ili estis malpli barbaraj, ol la aliaj invadintoj, kiuj fine sin konvertis al katolikismo.

La estrado de vizitogoj, nemulte daŭris. Ĉar en la jaro 771 la araboj trairante la Ĝibraltaran marokolon venkis la gotojn je la fama batalo apud la Rivero Gvadaleto, estrigis la tutan duoninsulon, escepte en la kaŝangulo de l' asturaj montaroj kie sin rifuĝis Pelaĝo. Pelaĝo, gota princo, iom post iom reprenis teritoriojn, al la maŭroj, larĝigante la limojn de sia teritorio.

Komencinte la rekonkeron kiu daŭris ok jarcentojn, Pelaĝo iom post iom, estis repreninte iajn teritoriojn, al la araboj, kaj siaj posteuloj, gajninte ĉiam pli da teritorio al la malamikoj, per intensaj bataloj.

Tiu ĉi rakonto celas la diskonigadon de la aroganta obstineco de la katolika Hispanio, kiu de 1512, dum preskaŭ 500 jaroj, daŭre subpremis la vaskan popolon. La Antikva Kastilio-Aragono delonge sinarogas la estrigadon de la duoninsulo Iberio, kaj forgesas ke, ĝi apenaŭ (laŭ la prahistorio de Iberio) donas vivsignojn, post Ia reĝeco de la Katolikaj Gereĝoj, dum la vaskoj, estis la unuaj, kiu situis sin, en duoninsulo kaj estis: la vaskoj keltiberoj, la nuraj kiuj rezisis la invadadojn de la nordaj barbaroj, la araboj kaj romanoj.

*Jose Do Nascimento Marques*

# JOSÉ N. MARQUES

Mia kara José do Nascimento Marqués estis la esperantisto kiu mi ŝatus esti koninta kiam mi interesiĝis pri Esperanto en mia naskiĝ urbo La Plata, apud la jaro 1.960. Eble li estus antaŭpuŝante mian esperantiĝon per tridekjaroj!

Mi nur sciis pri li tridek jarojn poste, kiam mi jam estis esperantisto. Kaj interŝanĝis korespondadon, mi donacis al li materialon kaj vidbendon, kaj li sendis al mi verkojn.

Mi konis lin persone nur poste, en la jaro 1999, en kiu eble estis la unuan e-kunsido de la urbo, registrita en foto kune kun samideano Maurício. Mi promesis verki artikolon pri Esperanto por la loka ĵurnalo, por ke ne plu okazu ke interesato pri esperanto en la urbo restu sen scii pri samideano. Mi ne realigis mian promeson ankoraŭ, bedaŭrinde. Restas en la urbo almenaŭ samideano Javier Valli, mi esperas ke li prenu la flagon lasita de José, kaj daŭru la ĉeeston de nia kara lingvo en mia kara naskiĝurbo.

Mi telefonis al José en Majo 2004, kaj poste li sendis al mi leteron fine de Junio 2004, ke mi legis nur revenante el Argentino en Agosto 2004. El la letero mi kopias lian resuman biografion de la komenco de lia vivo (oni diras, ke la homo sentas kiam morto estas proksima) kaj la artikolo ke, li plendas, plurajn e-revuon ne akceptis publikigi (ĉu pro aserti tion, ke la hispana registaro estis terorista?) inkluzive **Brazila Esperantisto**.

Ĉar mi scias pri la malfacilo havi akceptadon de artikolojn en e-revuoj (historio ke mi rakontos en alia paĝo) inkluzive en BE, mi tuj decidis publiki la artikolon, tie ĉi sube.

## RESUMA BIOGRAFIO DE JOSÉ N. MARQUES

**José do Nascimento Marques** skribis:

*Mi fariĝis Esperantiston je la 15a jaraĝon en 1936 post la perforto de la P.D.E. de la klerika-faŝista diktaturo de Salazaro en Portugalio. Mi ne naskiĝis en Barejro, mi naskiĝis en Galveias, negranda vilaĝo lokita en la provinco Alenteĵo, distrito Portalegre.*


*Post la unua klasa lernado mia patro portis min al Barejro, lokita en la maldekstra bordo de l'rivero Teĵo, antaŭ Lisbono, al la hejmo de pliaĝa fratino mia en Barejro.*

*En Barejro mi homiĝis, kaj en ĝi mi estis edukita en la ŝipkonstruejo kie mi eklaboris de 13 jaroj kaj sur stratoj estis lerninta la A.B.C. de l'klasa-laboristaro (hodiaŭ jam forgesita ĉe la Eŭropa laboristaro).*

Mi aldonas:

Li forlasis Portugalion persekutita de la terura diktatorado de Salazar, kiu tiom da esperantistoj kaj liberpensuloj mortigis, same kiel Francisco Franco poste faris, sub la silento de la okcidentaj nacioj. 50 jaroj de diktatorado, estas rekordo kiun multaj diktatoroj envias.

*Jozefo Lunazi*



José do Nascimento Marqués, baldaŭ antaŭ sia morto.

# ONI BEZONAS PROFESOROJN POR INTERNACIA STUDUMO EN BYDGOSZCZ

Kiel ĉiuj scias, en Bydgoszcz (Polando) funkcias ekde deko da jaroj la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kie studentoj de la tuta mondo povas studi karieron pri turismiko pere de la internacia lingvo Esperanto.

La studentoj povas akiri tri nivelajn diplomojn, t.e. **Bakalaŭro** (tri jarojn), **Magistro** (aldonajn du jarojn) kaj daŭrigi studadon ĉe AIS-San Marino por **Doktoriĝo**, krom ricevi aliajn titolojn kaj atestilojn..

La titoloj estas agnoskitaj de la Pola Ministerio pri Edukado, kaj por AIS-San marino, kio donas al tiuj titoloj internacian valoron.

Nuna financa situacio de la Studumo estas ne bona, kaj ĝi estas en grava risko malaperi.

Ne oni povas permesi ke tio okazu; ke tiel grava projekto por la movado simple malaperu.

Ni petas profesorojn de la tuta mondo, kiuj pretu veni al Bydgoszcz por instrui, por unu semajnon, du tri, ktp, laŭ forme de rapidaj kursoj aŭ seminarioj, kiuj donos al la studentoj eblecon konatiĝi kun temoj rilataj al la tuta mondo.

La Studumo havigas al la profesoroj kiuj volas veni modestan ĉambron por tranokti, ĉe la Studumo, kaj iomete da helpo por la manĝo. Ne eblas iun monon pagi.

La instruado tie estas ege alloga, ĉar studentoj estas el diversaj landoj kaj kontinentoj, kaj la instruado okazas pere de la lingvo Esperanto.

La profesoroj devas intrui pri temoj kiuj havu iun rilaton al lingvoj, kulturoj, tradicioj, monumentoj, turismon el la diversaj mondopartoj.

Gravas ke la profesoroj havu instrukapablon, kaj scipovu havi bonan rilaton kun la gestudentoj.

Volontuloj kontaktu Augusto Casquero, augustocasquero@hotmail.com.

La lernojaro komenciĝos jam en oktobro.

La aldonaj fotoj estas de la lasta AIS-sesio en Komarno (Slovakio) fine de aŭgusto-komenco de septembro, kie la polaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kaj bakalaŭroj kaj magistroj (19) havis grandegan sukceson. Ĉiuj sukcesis en la finaj ekzamenoj, kaj ricevis altajn notojn.

*Augusto Casquero (Hispanio)*
*Profesoro de la Studumo*




SAT ESPERANTO ILEI


LA 89-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
LA 89-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

# Ne estis songo, ĝi okazis!

Mi ĉiam vidis Ĉinion kiel ion foran kaj fantazian, ne atingeblan de mi, krom sonĝoj aŭ revoj miaj intimaj. Tamen, lastan someron mi povis viziti tiun mirindan landon kadre de la 89-a Kongreso de Esperanto. Multajn aferojn mi povus diri pri tiu evento, sed mi ne povus apartigi la homajn vivspertojn, per kiu mi enriĉiĝis tie el la esperanta evento ĉijara.

Kie komencas la persona, subjektiva travivaĵo, kie finas la objektiva raporto pri tiu evento? Mi konscias, ke eble la posteco prenos ĉi tiun eseraporteton kiel sola atestilon restantan (certe pli bizaraj aferoj jam okazis!) , sed eĉ starante sur la piedoj de posteuloj, mi certe preferus ankaŭ koni iomete pri la apartaj korbatoj, kiujn averaĝa esperantisto sentis tiam, kiam li unuafoje rendevuis kun milijara lando, mirlando de Marko Polo, prisopireska Ĉinio.



Do, ne ĝenas min veni antaŭ vi, samideanoj, kaj esti ĉifoje subjektiva, partia kaj korinklina al tiu lando, kie mi estis feliĉa dum kelkaj horoj, kiuj ŝajnis minutoj, eĉ se vere ili entutis semajno.

La unua afero, kiu impresis min pri la lando de la sunleviĝo estas la granda toleremo, kiun mi observis surterene, kiu anticipis al mi tuj de kiam nia aŭtobuso venis de la flughaveno al urbego Pekino: ŝoforoj ne akre kriis unu la alian, kiam oni rapidis subite antaŭ la propra veturilo, sed discipline oni malrapidiĝis iomete, tiel ke la alvenanto ne koliziu.

La alia sento, kiun oni havas en Ĉinio, estas amaseco: ĉie estas multe da homoj en tiu lando. Eĉ en la murego, eĉ esperantistoj, ni estis multaj. Tiom multis ni esperantistoj tie, ke oni ade laŭparoligis La Esperon dum horoj, je nia vizito al la fama Murego de Ĉinio, proksime de Pekino.

La kongresa temo estis Lingva egaleco

**en internaciaj rilatoj, kaj estis gvidata, kiel kutime, de Humphrey Tonkin, kaj ni prilaboris ĝin dimanĉon, mardon kaj ĵaŭdon. Finfine, ni venis en interkonsenton, kiu produktis la tiel nomitan Pekina Deklaro:**

*La 89a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24a ĝis la 31a de julio 2004 kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,*

**Traktinte** *la temon «Lingva egaleco en internaciaj rilatoj»,*

**Notante,** *ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesko,*

**Memorante**, *ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko,*

**Notante** *la «Raporton pri Homa Evoluigo 2004» de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,*

**Alte taksante** *la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkomprenigo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucio de Unesko,*

## DEKLARAS

**Ke** *demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,*

**Ke** *estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,*

**Ke** *neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,*


**Ke** *sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj siajn utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan komprenigon en egaleca etoso en nia hodiaua mondo,*

**Ke** *por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la Unesko-rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolernadon ĝenerale kaj antauenigas internaciecan aliron al la mondo.*



**Pri la ceteraj eroj de la Kongreso de Ĉinio, ni lernos la venontan Kajeron.**

# La doktoro de Sefarad'




*«Asadu Al·a ila-lah ua Muhammad al-rasul Al·ah».*

*Mi dezirintus, ke je la aŭdo de tiu konfeso en la araba, kiu asertis, ke ne estis alia Dio ol Al·ah kaj ke Muhamo estis lia senditulo, la grundo ekmalfermus engluti nin ĉiujn, ke la suno vestiĝus per funebro kaj ke la ĉielo faldus kiel pergamino. Tamen, nenio tia okazis. Nur silento, silento subpremanta kaj peza, kiu ŝajnis preta vori nin kiel la granda fiŝo englutis Jonason.* Abba, *la plej respektata rabino de Qurdubo, la homo, kiu kreis min je la sino de mia patrino kaj kiu instruis min legi kaj obei la Toraho ĵus apostatis!*

Jen unu el la dramatikaj momentoj de tiu bonega novelo, kiun mi ĵus legis, **La doktoro de Sefarad'** (El médico de Sefarad), kiu priskribas novele la vivon de unu el la plej famaj doktoroj, kiuj naskiĝis en la sojlo de nuntempa Hispanio. Li estis judo, kiu devis forlasi la landon Al-Andalus pro la netoloremo de fanatikaj islamanoj de la jarcento 13-a, kaj praktikis sian arton, medicinon, en diversaj landoj arabaj, kie li atingis grandan famon kiel bonan doktoron kaj erudiciulon. La novelon verkis historiisto César Vidal, kiu jam verkis pli ol cent verkojn, kaj tio donas al tiu ĉi aldonan bonon, ĉar ĝi priskribas la etoson historian de tiu tempo, kiu ofte estas idealigita laste. Veras, ke tiutempe islamanoj permesis la ĉeeston de kristanoj kaj judoj en sia lando, sed tio ne estis senpage, kiel ni vidas en tiu ĉi novelo.

La prezento de la vivo de la plej fama doktoro de Hispanio, Maimónides, estas certe originala: ni vidas per sinsekvaj ĉapitroj la rakonto pri du diversaj tempoj en lia vivo: en Al-Andalus kaj post ekzilo.; sed ankaŭ estas du partoj en la libro: La libro de Sefarad kaj la libro de la manko de Sefarad. Ni notu, ke *Sefarad* estas la nomo per kiu judoj konas Hispanion, kiun li devis forlasi en la jarcento 15-a kun la sopiro reveni iam.

# DEKLARACIO

La 77-a Kongreso de SAT, kunveninta de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2004 en Bratislavo,

· **lanĉas** solenan alvokon al la registaroj de landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo, ke ili rapide subskribu ĝin, por ke universaliĝu tiu Konvencio pri la detruo de kontraŭ personaj minoj kaj pri la malpermeso de ilia uzo, produktado kaj stokado;

· **emfazas** la nepran neceson de kultura kaj kleriga laboro por batali kontraŭ nescio kaj dogmemo, kiuj estas gravaj obstakloj al paca kaj senperforta forigo de la nuna fia sociordo;

· **atentigas**, ke vortoj kiel "klasbatalo", "kamarado", "socialismo", "laboristo", kvankam ilin misuzis diversaj reĝimoj kaj sociaj grupoj, priskribas daŭran realecon, kaj ke estas tasko de nia asocio redoni al tiuj vortoj ilian ĝustan signifon;

· **alvokas** ĉiujn progresemajn esperantistojn aliĝi al SAT kaj kunagadi en ĝi;

· **alvokas** progresemajn neesperantistojn kunhelpi per siaj propraj rimedoj por levi la nivelon de la mondskala perlingva komunikado ĉe la laboristaro, por kiu celo Esperanto prezentas la plej taŭgan solvon.

# GVIDREZOLUCIO

La 77-a Kongreso de SAT, kunveninta de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 2004 en Bratislavo, alvokas la SAT-anaron,

· **helpi** per lingva kontrollegado por certigi la kvaliton de la eldonaĵoj de SAT;

· **kunlabori** en la nun fondita Poresperanta Fako de SAT;

· **kunhelpi** riĉigi la kulturpaĝojn de SAT;

· **solidarece** helpi al kamaradoj sen retaliro per laŭpeta disponigo de la jam pretigita materialo;

· **diskonigi** publike la situacion de la malliberigitaj PORTOS-anoj.

La Kongreso alvokas la membrojn de la SAT-frakcioj diskonigi SAT en siaj respektivaj politikaj medioj kaj raporti pri siaj agadoj en sia frakcia rubriko en **Sennaciulo**.

Ne forgesu, ke SAT estas unuavice la SAT-anoj. Pensu, diskutu kaj poste mem plenumu viajn agadproponojn!

# Imperiismo —for de Irako!

1. La rekta koloniismo ne taŭgas por moderna imperiisma ŝtato, kiu preferas regi nerekte, per sia ekonomia potenco, malantaŭ kiu ĉiam staras ĝia milita kapablo. Tial la registaroj de Usono kaj Britio nun serĉas strategion por eliri el Irako.

2. Sed la rapidecon de tiu eliro pli kaj pli regas ne la imperiisma volo, sed la kreskanta opozicio al la okupacio, ĉu de la popoloj de Usono, Britio kaj ceteraj membroj de la "koalicio de la volantoj", ĉu de la ribelanta popolo de Irako.

3. La imperiismo ja estas la ĉefa kaj komuna malamiko de la laboristaro kaj popolo de Usono, Britio kaj Irako. Defendante la naciajn rajtojn de la Iraka popolo, la laboristaro de Usono, Britio ktp

# SALUTO DE K-DO JAKVO SCHRAM, PREZIDANTO DE LA P.K. DE SAT, okaze de la 77-a Kongreso, en Bratislavo

Karaj gek-doj, karaj gastoj,

Estu bonvenaj al nia 77-a **SAT-kongreso** en la urbo Bratislavo.

Mi ne estas diplomato, tial mi ne komencas laŭdi la belecon kaj gravecon de ĉi tiu lando, kiun mi vizitas la unuan fojon en mia vivo. Mi jes, ja evidente povus dissemi kelkajn afablecojn, sed mi estas homo kiu ĉiam klopodas diri la veron aŭ tion, kion mi akceptis kiel vero pere de diskutoj, kontaktoj kaj spertoj. Do permesu ke mi nun ne ludu diplomaton. Evidente mi jam havas unuan impreson pri kio mi vidis dum mia vojaĝo ĉi tien kaj pri la bildoj kiujn ni ĉiuj povis trovi en la mirinda interreto. Ĉi tiu unua impreso kuraĝigas min. Mi estas certa ke ni havas bonan lokon por fari nian kongreson.

Kio ankaŭ kuraĝigas min estas la laboro jam farita de - unuflanke la tuta skipo de la OKK de nia Kongreso kun ĉekape, almenaŭ en rilato kun mi, nia kamarado Petro Chrdle kaj de la flanko de la Plenum-Komitato, kamarado Arturo Prent.

Antaŭ 125 jaroj naskiĝis kamarado Lanti. Eble la fakto ke mi nun atentigas vin pri tio malplaĉus al li, mi ne scias. Legante liajn tekstojn kaj la tekstojn pri li, mi konkludas ke Lanti plej verŝajne, ne estis ekzemplo de facila homo, eĉ por la homoj ĉirkaŭ li sed certe ankaŭ ne por si mem. Tiu, kiu legis pri Lanti scias ke li estis homo kiu, eble dum sia tuta vivo, serĉis la veron, pri la koncepto kiu estas plej bona por la homaro. Lanti ne ŝatis ke oni laŭdu lian personecon, do ni ne faru. Sed mi volas paroli pri lia ideo krei asocion kiu estas unika.

**Unueca fronto de laboristoj** devas esti, laŭ la ideoj de Lanti, nia asocio.

Asocio kiu eĉ nun, 83 jarojn post fondiĝo, daŭre ekzistas, sed pri kiu nur malmultaj homoj komprenas la fortecon kaj ĝian strukturon. Forteco, kiu samtempe montriĝas esti ĝia malforteco, ĉar ŝajnas ke en nuna tempo, por intelekta kaj konscia laboroj ekzistas iom malpli da intereso ol devus ekzisti, almenaŭ tion mi opinias. Ankaŭ esperantistoj ne montras intereson pri la sorto de la sammondano. Aŭ por esti pli precize, ili ne ŝatas aŭ ne volas unuiĝi en Unuecan Fronton aŭ ĉu eble tiu Unueca Fronto timigas ilin? La fakto ke ili devas aŭskulti la opiniojn kaj tezojn de aliaj, la fakto ke en **SAT** ne estas loko por fanatikismo?

Se mi bone komprenis Lanti-n, mi pensas ke li celis krei asocion kiu defendas socialismon, humanisman socialismon laŭ la plej larĝa bazo imagebla. Lanti ne nur diris la de ĉiu esperantisto konatan frazon: “For la neŭtralismon!” Li iam ankaŭ, kaj certe kun la sama konvinko diris: “For la fanatikecon!”, almenaŭ se mi povas kredi la tre seriozan verkon, ”La danĝera lingvo” de Ulrich Lins.

*For la fanatikecon*, signifas, denove laŭ mia kompreno, ke ni ĉiuj rajtas havi nian filozofian, etikan kaj politikan konvinkon, sed ke ni devas havi respekton por aliaj opinioj kaj konvinkoj kiuj defendas laŭ aliaj manieroj socialismon.

Mi nun esperas ke neniu inter vi miskomprenu la vorton *socialismo* de mi nun uzata. Per *socialismo* mi indikas ne partipolitikan ideon, sed la humanisman ideon de kunlaboro, de respekto, de sociala agado. Socialismo pri kiu mi parolas ne permesas ke unu homo ekspluatadu alian homon. Mia socialismo ne akceptas ke unu homo regu alian homon, ke ekzistas personoj kiuj ornamas sin per titoloj kaj tiel postulas de aliaj homoj obeadon, submetiĝon al simboloj, mitoj, rakontoj kaj personoj. Se mi eraras pri tio, nu tiam staras antaŭ vi prezidanto de Plenum-Komitato kiun vi nepre devas malelekti. Tiuj inter vi, kiuj sekvas mondan politikon, scias ke en la lando kie mi loĝas, 33% de la homoj voĉdonas por faŝismema politika partio «Vlaams Blok».

Post la baloto por Eŭropo kaj la Belgaj Federaciaj Ĉambroj, mi aŭdis politikistojn de aliaj politikaj tendencoj diri; “ni devas respekti ankaŭ tiun opinion». Ĉu eble per tio ili volas montri ke ili ne estas fanatikuloj? Mi dubas. Ili, laŭ mi, nur volas flati tiun parton de la elektbrutaro kiu ĵus voĉdonis por alia partio, faŝismema partio. Ili do volas respekti la opinion de unu miliono da balotantoj por faŝismema politika partio.

**Mi havas alian opinion pri tio, mi diras ne**! Ni ne devas respekti tiun opinion.

Kial ni respektu opinion de demagogoj kaj de ĝia sekvantaro kiuj klopodas dividi homojn de malsamaj deveno, koloro, kredo kaj filozofio. Mi ne povas imagi ke Lanti kaj liaj kunuloj kreis Sennaciecan Asocion Tutmondan por havi komprenon por faŝistoj, por klano kiu faras ĉion por dividi homojn laŭ koloro, deveno aŭ kredo. Mi pensas ke Lanti kaj liaj kamaradoj kreis asocion por trovi la vojon al internacia solidareco, la vojon al kunagado inter homoj.

Mi, se mi bone komprenas Lanti-n, pensas ke la celo de la kreiĝo de **SAT** kaj ĝia daŭra ekzisto estas; unuigi ĉiujn **maldekstrajn** progresemajn fortojn kaj mi substrekas en tio la vorton **maldekstra** ĉar jam tro ofte mi aŭdis reakciulojn uzi la vorton *progresema* por indiki ilian agadon malakcepteblan.

Mi timas ke pro tio nuntempe **SAT** iom suferas malatenton de la Esperantistaro.

Ankaŭ en Esperantio estas laŭ mi bedaŭrinde tro da intereso por la propra vero, la propra regiono, la naciismo kaj fanatikismo de grupoj kiuj ne celas internacian solidarecon sed kunigas en grupojn kiuj celas dividi homojn laŭ deveno, koloro kredo kaj nacio. Nu tiu laboro por plikreskigi nian nacion, protekti nian regionon kaj nian superecon ne estas la laboro de **SAT** kaj giaj anoj.

Plej verŝajne multaj homoj ne aliĝas al **SAT** pro la vortoj kiujn ni uzas -*klasbatalo, maldekstro, socialismo, unueco*. Kaj kredu min, mi iom povas kompreni ĉi tiujn homojn. Tro ofte dum la antaŭa jarcento la vortoj estis misuzataj, perfortitaj de demagogoj kaj diktatoroj. Ekzistas grandaj bibliotekoj kun libroj nur pri tiuj kretenoj kiuj uzante la ĵus menciitajn vortojn kaptis per ĝi la potencon. Imagu, ili uzis ĉi tiujn vortojn por subpremi homojn kvankam la vortoj estis esprimoj de libereco. Al tiuj, kiuj ne komprenas miajn frazojn mi nur povas rekomendi du librojn, "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins kaj la libron "7000 tagoj en Siberio" majstre tradukita de nia k-do Kreŝo Barkoviĉ.

Mi jam ofte pensis, ke ni devas trovi novajn vortojn por priskribi la vortojn kiujn **SAT**-membroj dum sia tuta historio uzis. Pli modernajn vortojn, sed bedaŭrinde mi ne trovas ilin. Eble iam la lingvaj spertuloj inter vi trovos alternativajn vortojn kun la sama signifo, sed ĉu vere tio povas aŭ devas savi **SATn**; la signifo de vortoj laŭ la realo kaj ne laŭ la imagoj de diktatoroj?

Jes mi povas kompreni ke en la lando kie ni nun havas nian **SAT**-Kongreson la haroj de multaj homoj, enloĝantoj de Slovakio hirtiĝas pro la vortoj klasbatalo, kamarado, ktp. Mi petas tiujn homojn: reprenu la veran signifon de la vortoj.

En Belgio, la faŝismema Vlaams Blok uzis, jam kelkfoje la "unuan de majo", la festotagon de la laboristoj, por fari grandan feston. La feston de la popolo. Imagu, ĉi tiuj kaĉuloj forprenas nian tagon, "la unuan de majo", la tagon de la tutmonda laboristaro por havi propran feston. Se ili iam akiros la plejmulton, miaj karaj amikoj, la unua de majo eble iĝus en Flandrio la festo de la faŝistoj, de la maltoleremuloj, de la rasistoj. Tamen karaj kamaradoj en mia koro ĝi restos eterne la tago de la klasbatalo, de la socialismo, de ni, la laboristoj, kaj jes la malamiko povas forpreni de ni niajn terminojn, niajn simbolojn, nian festotagon, sed ili neniam povas forpreni nian konvinkon, nian koron, nian spiriton.

**SAT** elektis kiel laborlingvon Esperanto-n, la kreaĵon de iom naiva sed certe tre bonkora dr Zamenhof. Homo kiu pensis en la komenco, kiel juna knabo ke universala lingvo povas solvi ciujn mondajn problemojn.

Nur lingvo, nur vortoj, karaj amikoj solvas nenion. Por solvi mondan problemon de milito, malsato, ekspluatado de homoj, de kapitalisma supereco, ni bezonas pli ol nur Esperanton, ni bezonas pli ol nur vortojn kaj frazojn. Ni bezonas engaĝigon. Ni devas alstrebi mondan solidarecon inter ciuj homoj. Ne povas esti ke iu homo devas klini la kapon antaŭ alia homo, devas montri respekton al bildoj kaj simboloj kaj al strangaj vestitaj mondoregantoj kiuj pensas ke ili estas reprezentantoj de iu estaĵo kiun ili nomas, por aldoni al ĝi gravecon, dio.

Socialismo, la humanisma socialismo kiun **SAT** celas bezonas raciecon por esti aplikata. Mistikeco kaj vualitaj veroj pri eventoj kiuj superas iun realecon ne helpas nin krei la bezonatan mondan solidarecon.

Ĉu bonfarado ne helpas? - demandas de tempo kamaradoj. Bonfarado karaj amikoj, estas laŭ mi la akcepto de divido de homoj en riĉajn kaj malriĉajn, en havantajn kaj nehavantajn. En mia mondo de socialismo ne ekzistas bonfarado, ĉar en tiu mondo ĉiuj homoj havas la samajn rajtojn, la samajn ŝancojn, la samajn devojn. En mia socialisma mondo homoj

ne devas almozpeti au klini la kapon antaŭ demagogoj kaj regantoj, sed ĉiu regas sian propran vivon.

Ni povas atingi ĉi tiun mondon pere de la ideoj de kamarado Lanti. *Ni ne lasu transkui nian asocion per la pasioj kaj taktikaj zigzagoj de la malsamaj laboristaj partioj*, diris Lanti. Nia asocio ne estu partipolitika, sed eduka, kleriga, helpa, realiga. Ĝia ideo ne estu krei funkciulojn, sed eduki konsciajn revoluciulojn. Kaj karaj amikoj, konsciaj revoluciuloj ne estas laŭ la falsa bildo kiun kreis la malamiko de la progreso, persono kun armilo en la manoj.

Revoluciulo estas persono kiu havas konvinkon humanistan, socialistan, homrespektan, kaj revolucion ni povas fari per simpla agado, ekzemple pere de civila malobeo por nomi nur unu.

Ĉu daure ekzistas intereso por ĉi tiu ideo? Laŭ mi JES - sed junuloj jam komencas nomi min maljuna kaj tion mi eble jam iom estas, maljuna socialisto, radikala socialisto eĉ kiu daŭre kredas en monda solidareco, en la bezono de unuiĝo de ne nur proletoj sed de ĉiuj maldekstraj progresemaj fortoj.

Eble nuntempe la plejmulto de homoj preferas sin kaŝi en iu kaĉo de sensignifa neŭtraleco ĝis fanatika naciismo. En iu falsa mondo de ŝajninternaciismo kies plej grava celo estas defendi proprajn landlimojn, proprajn atingaĵojn kaj propran superan kulturon.

Feliĉe mi ne apartenas al ĉi tiu grupo, sed fiere diras ke mi apartenas al **SAT**, la asocio kie ideoj kaj ideologio, kaj certe engaĝigo ludas gravan rolon.

Ni havas nun tutan semajnon por diskuti, serĉi samideanojn, esplori la plej favoran agadkampon, frakcion, laborgrupon aŭ fakon.

Estas fakto ke la plej granda forto de **SAT** ne estas nur ĝia internaciismo, sennaciismo, la uzado de Esperanto, sed nia volo krei alian mondon, mondon en kiu internacia solidareco, humanisma socialismo kaj komuna agado ne estas nur vortoj en la aero, sed reala celo, nia plej grava batalo. Ni povas fari ĉi tiun batalon el nia fako, frakcio aŭ laborgrupo, sed finfine ni devas scii, ke nia celo devas esti unuigi ĉiujn maldekstrajn progresemulojn en fortegan grupon kiu batalas **«ĉar alia mondo eblas»**. Pli ĝusta mondo, pli socialisma kaj humanisma mondo eblas kaj por fari tion mi volas uzi la vortojn de kamarado Lanti: **"For la fanatikismon"!.**

Mi deziras al vi ĉiuj tre fruktedonan kongreson kaj mi estas certa, ke via celo ne estas NUR ferii en Bratislavo, sed kunkonstrui la novan **SAT-n** por la estonto. Ĝi estu kupolo de ĉiuj maldekstraj progresemaj homoj, kiuj celas krei alian mondon, ĉar tio ne nur eblas, sed absolute necesas.

Vivu humanisma socialismo!, Vivu **SAT**!

*Jakvo*



## SALUTO AL LA KONGRESO DE K-DO RENATO CORSETTI, PREZIDANTO DE U.E.A.

Karaj kamaradoj,

Mi profitas ĉirkaŭvojon por sendi al vi mesaĝon okaze de la inaŭguro de via ĉi-jara kongreso.

Mi bedaŭras ne povi esti tie kun vi hodiaŭ, sed mi ĵus revenis el Ĉinujo kaj baldaŭ devas iri al Bilbao.

Mi salutas vin kiel ano de SAT kaj ano de UEA samtempe sed ĉefe kiel esperantisto. Mi kredas ke la asociaj limoj kaj malkonsentoj inter asocioj ne devus malhelpi nin kunlabori pri komunaj temoj.

Mi konsentas, ke mi neniam vere komprenis la strukturon de SAT, sed nun mi komencas kompreni ĝin kaj pro tio mi alvokas al la simplaj SAT-anoj, ke ili bonvolu konsideri ke SAT devas fariĝi la gvidanto de ĉiuj esperantistaj maldekstremaj kaj progresemaj movadoj en la mondo. Mi ne vidas aliajn eblecojn por doni sencon al SAT.

En mondo, en kiu la ununura kapitalisma penso provas, ĝis iu grado kun sukceso, establi sian regadon de la mensoj de la publiko, ni devas evidente esti ĉe la flankoj de la rezisto-movadoj kontraŭ perforta tutmondigo.

Mi ege ŝatus se ni povus starigi kunlaboron inter SAT kaj UEA laŭ kiu SAT plenumus la rolon de gvidanto de ĉiuj kampanjoj, kiuj por UEA estas tro malneŭtralaj. Mi pensas unuavice pri agadoj ĉe Mondaj Sociaj Forumoj.

Ne estas konkurenco inter SAT kaj UEA. Mi ne laciĝos rediri tion. La plej granda bonŝanco por UEA estus tre forta SAT. Mi konas la ideon, laŭ kiu SAT estas per-esperanto organizaĵo, kiu ĉefe utiligas Esperanton por la klasbatalo. Sed la limoj inter per-esperanta organizaĵo kaj por-esperanta estas tre pli malsolidaj ol oni imagas.

Estas spaco por kunlaboro. Ni kaptu tiun ŝancon!

Permesu al mi citi kelkajn vortojn el mia parolado okaze de la malfermo de la tiel nomata *Simpozio Nitobe* dum la UK en Pekino. Ĉu ili ne montras ke ni batalas la saman batalon?

*Esperanto estas lingvo kaj ĝi signifas malsamajn aferojn por malsamaj homoj, sed ekzistas unu kerna respondo: oni okupiĝas pri Esperanto, ĉar oni estas milda kaj paca okupiĝanto pri lingvoj kaj kulturoj sed kun tre forta, obstina, foje mania, sento pri justeco en internaciaj rilatoj.*

*Justeco kaj egaleco inter la homoj kaj la popoloj estas la rokoj, kiuj estas la bazo de nia tuta konstruaĵo.*

*Sed bedaŭrinde tiu mensostato ne ŝajnas esti ĝenerala en la mondo kaj eĉ ĝi ŝajnas iĝi pli kaj pli malmoda, en ĉi tiu periodo en kiu postmoderneco akiras pli kaj pli la konturojn de antaŭmoderneco, de la eŭropa mezepoko en kiu forto, perforto kaj fortaj regantoj havis ĉiujn rajtojn kaj la normalaj homoj rajtis nur obei. Nun, kontraste kun la Meza epoko, oni rajtas ankaŭ rigardi televidon.*

*Certe estas eble en la homa naturo provi regi aliajn kaj preni la maksimuman eblan profiton al si mem, sendepende de moralaj, etikaj, ideaj konsideroj. Sed mi kredas ke en la homa naturo estas ankaŭ samtempe aspiro al la belo, al la bono, al la justo.*

*La parolantoj de la internacia lingvo Esperanto dum la tuta pasinta jarcento agis en la mezo de militoj kaj internaciaj streĉaj rilatoj per klopodoj revenigi la homaron al sentoj de toleremo, de rekono de malsameco, de provo interkompreniĝi kaj kompreni la motivojn de la alia flanko.*

*Tia estas nia historio kaj pri ĝi ni fieras.*

Kaj SAT kaj UEA ambaŭ estas parto de tiu historio. Ni restu indaj je ĝi!

Multajn bondezirojn por via kongreso!

# Muziko

**Sacha Distel**, la homo, kiu famigis la kantojn «Skubidu'» kaj «Pluvgutoj falas sur mian kapon», mortis la 22an de julio de 2004, kiam li estis 71jaraĝa.

Li naskiĝis en Parizo la 29-an de ĵanuaro de 1933, de gepatroj Léo Distel kaj Andrée Ventura, tiu lasta pianisto konzerta, kiu karieriĝis je la fama Konservatorio de Parizo. Onklo Ray Ventura gvidis muzikbandon en Francio antaŭ la Dua Mondmilito, kaj famiĝis per sia grupo «La gimnazianoj». Saŝa' kaj onklo Rej estis tre proksimaj, kaj tiu lasta konsideris la nevon kvazaŭ li estu lia vera filo; sekve li edukis lin en muzikon, kaj Saŝa' atestis multajn performojn de onklo kaj bando.


La familio estas parte juda, kaj pro tio la Gestapo arestis la patrinon dum la milito, je 1942, kaj enkampigis ŝin. Sed ŝi sukcesis retrovi sian familion post liberadon de Francio je 1944, ne sen tio, ke la familia tragedio vundis lin dum jaroj.

## Komencoj

Dekomence, Saŝa' lernis pianon klasikan, sed li baldaŭ emis la svingan ritmon, kaj je 1947 li ŝanĝis sian instrumenton: li lernis gitaron kun Enriko Salvador', kiu ludis en la bando de lia onklo. Saŝa' komencis tiutempe ludi en jaza bando de sia lernejo, sed de kiam, je 1948 li ĉeestis la unuan koncerton, kiu Dizi Gilespi, fama jaza trumpetisto, performis en Parizo, li estis mordita de la jaza viruso por ĉiam. ☺

Je la kvindekaj jaroj Saŝa' volis esti gitaristo unuaranga, kun la nova spirito de libereco, kiu blovis la bohemian najbararon de Sen Ĝermen'. Je 1951 li venkis konkurson por la plej bona amatora jaza gitaristo. Du jaroj poste, magazinoj tiusektoraj konsideris lin la plej bona jaza gitarludanto dum la sekvintaj sep jaroj.

Je 1952, onklo Rej helis lin atingi Novjorko por labori kiel internulo de muzika eldona firmao.



La juna muzikisto vizitis multe da jazkluboj de Manhatan'. Kiam li revenis en Francion, li gajnis postenon starantan en la franca muzika scenejo, kie li akompanis Jxuliet' Greko' kaj editis la muzikon de Georgo Brasan'. Je 1955 li aperis en la disko de Lajonel Hamton «Nova sono franca», kaj la sekvintan jaron, en «Vespero en Parizo», de Modern Jazz Quartet (moderna kvaropo jaza).

## La gitaristo, kiu volis kanti.

Je la fino de la kvindekaj jaroj, lia romanco kun filmstelulino Briĵit' Bardo' metis lian vizaĝon sur la koverto de preskaŭ ĉiu ĵurnalo kaj magazino francaj, dum li revis pri multe pli gravaj aferoj. Li sopiris sekvi la paŝojn de Frank Sinatra kiel kantisto. Saŝa' finfine ekkomencis sian kantistan karieron je 1958, dum li aniĝis en jaztriopo ĉe la «Kazino de Alĝerio». Saŝa' prenis la mikrofonon kaj kantis «Skubidu'». La kanto plaĉis multe, kaj iĝis vera himno por adoleskuloj en Francio.

Iom poste je tiu jaro, Saŝa' Distel estis invitata aperi je la «Ed Sullivan Show» (la spektaklo de Ed Salivan) en Usono, kaj tio konfirmis, ke la juna jaza geniulo estis nun inventita lin mem kiel la gvidantan francan melodikantiston de la momento. Je 1959, li ĝojigis la francan rekordkartojn per sukcesoj

kiel «ho, kia nokto!», «Personuloj» kaj «Mia bela ĉapelo». Dume, direktoroj de la franca televido vikiĝis al la povo de tiu eleganta homo kun malklara bona aspekto. Saŝa' baldaŭ trovis sin kiel prezentisto de muzikprogramo. Estas facile kompreni, ke lia programo, «Gitaroj kaj kamaradoj», kreita je la komenco de la sesdekaj jaroj, baldaŭ iĝis «Saŝa' Show». Tiu programo ne nur aperigis la grandajn nomojn de la tago, sed ankaŭ provizis la ŝancon al granda kvanto da novaj talentoj.

Je 1963 li edziĝis al Fransin' Greo', skiĉampionino, kun kiu li havis du filojn. La sekvintan jaron li registris unu el la plej famaj kantoj el sia kariero, «La bela vivo». La kanto komencis kiel la dua flanko de simpla disko, sed baldaŭ ĝi iĝis egan internacian sukceson, kiun eĉ Toni Benet kaj Frank Sinatro registris kiel «The Good Life» (fakte, estis ĉirkaŭ 250 versioj de «La bona vivo»). Dume, Saŝa' sukcesis per sia nova kanto «Skandalo en la familio», «Sinjoro Kanibal'», «La bruligo de Rio» kaj «Kanto blua», kiuj donis al li multajn ordiskojn en la venintaj jaroj.

## Melodikantisto en Britio.

Je la sepdekaj jaroj Saŝa' Distel gajnis favoron inter virinoj en Britio pro siaj elegantaj vestoj, seksema franca akcento, kaj la ĉarmo, kiu iĝis lin la tipa *franca amanto*. Je 1971 li atingis nombron 1-an kiel la plej disvendatan diskon per sia «Pluvguto obstine falas sur mian kapon», kiun li poste reregistris france kiel «Tuta la pluvo falas sur min». Li kantis ĉe la London Palladium kaj la Teatro de la Princo de Wales, kaj aliaj gravaj ejoj de London.

Tiun tempon li estis pli ofte eksterlande –ĉefe en Britio—ol en Francio. Li iĝis tiom popola en Britio, ke li eĉ havis programon en Televido sabaton nokte. Aldone, li vojaĝis al Usono, kie li performis ĉe gravaj performejoj de Novjorko kaj Atlantic City. Dume, li prograndigis sian francan repertuaron per serio de novaj sukcesoj, kiuj inkluzivis «Accroche un ruban», «Mia unua gitaro», «Mia edzino», «La ŝipo blanca», «Rapidu, karulino, rapidu» kaj «La suno de mia vivo» (franca adaptaĵo de la kanto de Stivi Ŭonder «Vi estas la sunbrilo de mia vivo»), registrita kiel duopo kune kun Briĵit' Bardo'.

## Lastaj projektoj

Post kelkaj jaroj for de la scenjo, Saŝa' Distel revenis je 1983 per disko titolita «Mia gitaro kaj ĉiu tia jazo». Malgraŭ tio, ke kelkaj diris, ke ĝi havas eksmodan ĉarmon, franca televido denove ofertis lin gvidi programon, «La bela vivo», je 1985.

Je 1991 Saŝa' registris novan diskon, «Dediĉaĵoj», kun versioj siaj pri francaj amokantoj de ĉiam. Post du jaroj, li plenumis revon de sia tuta vivo: performi kun his onklo Ray Ventura kaj lia jazgrupo, kaj registri serion da grandaj sukcesoj kun «Les Super-Collégiens», kiu inkluzivis favoratajn kantojn de Henri Salvador, Michel Legrand kaj Stephane Grappelli.

Unu el la projektoj, kiujn li ne plenumis, estis verki muzikteatraĵon pri la vivo kaj kariero de Moris' Ŝevalje'. Li faris kelkajn provojn komenci la projekton dum dudek jaroj, sed li malsukcesis trovi la monon. Dume, li sukcesis ĉe la londona scenejo je 2001 per la rolo de la bedaŭrinda advokato Bili Flin en la muzikteatraĵo «Ĉikago».

Je aprilo 2003, Saŝa' Distel revenis neatendite per duobla disko titolita «En vers et contre vous». La unua volumo enhavas usonajn klazikajn kantojn, kiel «Mia amuza Valentino», «Kia mirinda mondo» kaj «Ĉiun la vojon» (duope kun Liza Mineli). La dua enhavas novan serion de francaj kantoj, per kiu li gajnis gravan francan premion, SACEM.

## Fina kurteno

La kantisto, salutata de britaj ĵurnaloj kiel «la esenca franca melodikantisto» mortis ĉe siaj bopatroj en Rayol-Canadel-sur-mer, je la sudo de Francio, la 22-an de julio de 2004, post kelkjara batalado kontraŭ malsano. La internacia ĵurnalaro agnoskas lin kiel unu el la plej grandaj francaj kantistoj, kune kun Moris' Ŝevalje' kaj Ivo Montando.

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



| | |
|---|---|
| REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** Tfn° (00 34) 658 166 323 | **Retskribu al jesuo@ono.com** |


http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k64.htm

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k64.htm





**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

**ISSN 1697-6460**